# Cigana romancaro

## Federico García Lorca



Hispana literaturo

# Cigana romancaro

Federico García Lorca




Hispana literaturo

Federico García Lorca

CIGANA ROMANCARO

Tradukis Fernando de Diego

Madrido
Hispana Esperanto-Federacio
2021

---

Originala titolo: Romancero gitano.

© De la traduko: Fernando de Diego, 1971.
© De la unua, papera eldono: Juan Régulo, eldonejo Stafeto, La Laguna (Hispanujo), 1971.
© De ĉi-tiu dua, bita kaj reviziita eldono: Hispana Esperanto-Federacio, 2021.
© De la kovril-bildo: Ana Manero, 2021.

Versio 0.1.0+20210914.

Bitoteko. Hispana Literaturo, 1.

Kreita per libera programaro.

# PREZENTO DE ĈI BITA ELDONO

Ĉi-jare nia kultura mondo jubileas duoble: 2021 signas la 50-jariĝon de la unua eldono en Esperanto de *Cigana romancaro* (hispane *Romancero gitano*), majstro-verko de Federico García Lorca en brila traduko de Fernando de Diego. Samtempe, 85 jaroj pasis de post la murdo de Lorca, verŝajne la plej granda poeto en la hispana lingvo. Jen kial Hispana Esperanto-Federacio (HEF) decidis lanĉi la Projekton Lorca por omaĝi la du aŭtorojn per diversaj agadoj.

Unu el ili estas la reeldono de *Cigana romancaro*, sed en bita formato. Ne nur la verko logas, sed ankaŭ la elstara traduko de De Diego, kiu aldone analizas la poemaron en sugesto-plena prezento. Menciinde, la libro aperis en la serio Beletraj Kajeroj de la kolekto Stafeto dank' al la senlaca kaj alt-kvalita laboro de Juan Régulo. William Auld verkis la antaŭparolon por la libro, kaj Antonio Valén tiun por la nuna bita versio.

Tiu kvaropo da nomoj, nome Lorca, De Diego, Auld kaj Valén, garantias rigoran laboron, belon kaj raviĝon. Mi havas nenian dubon, ke vi frandos ĉiujn partojn de ĉi eldonaĵo. Ek al leg'!

Ana Manero

# PRI LA AŬTORO

Federico García Lorca (1898-1936), tragika viktimo de la hispana interfrata milito, estis genia poeto kaj dramaturgo, verva pianisto, pentrartisto kaj prelegisto: kion ajn li tuŝis, tion li transformis en eternan belartaĵon. Aldone li posedis tian magnetan simpation, ke ĉiuj, kiuj lin traktis, tuj kaptiĝis de lia ĉarmo, lia talento kaj lia inspiro. Krom *Cigana romancaro* li verkis interalie *Libro de poemoj* (1921), *Kanzonoj* (1927), *Poeto en Novjorko* (1935). El lia dramaturgio menciindas *La domo de Bernarda Alba*, *Sanga geedziĝo*, *Sterila*. La tempopaso nur kontribuis tutmondan gigantigon de lia figuro.

# ANTAŬPAROLO POR LA DUA ELDONO, DE ANTONIO VALÉN

En 1994 Fernando de Diego respondis jene al la demando «Kiun vian tradukon vi plej ŝatas? Kial?»:

> Patro kun pluraj filoj amas ilin ĉiujn kun egala korinklino. Same okazas al mi pri miaj «traduk-filoj», ĉar mi generas ilin kun simila iluzio. Eble mi sentas iomete da prefero al *Cigana romancaro* –por kies pretigo mi laboris du jarojn– ĉar ĝis nun, en neniu etna lingvo aperis versio tiel fidela en la formo kaj en la senco, kiel la esperanta.

Lia lasta aserto malmodestas — sed samtempe veras. Mi klarigos tion per anekdoto. Antaŭ multaj jaroj, mi babilis kun kelkaj kunstudentoj de filologio pri niaj plej ŝatataj poetoj. La nomo de Lorca kompreneble tuj aperis, kaj unu el la amikoj asertis, ke la du unuaj versoj de *Romanco pri la nigra tristo* estas netradukeblaj en ajnan lingvon (kompreneble, tenante ritmon, rimon, aliteraciojn ktp).

## Unua ekzemplo

Tiuvespere, mi tuj serĉis hejme la tradukon de Fernando de Diego por tiuj du versoj. Ili tekstas jene en la originalo:

> Las piquetas de los gallos
> cavan buscando la aurora

En esperanta ortografio, ĝi sonus pli-malpli:

> Las piketas de los gajos
> kaban buskando l' aŭrora

La laŭvorta traduko estas:

> La pioĉoj / pikiletoj de la kokoj
> fosas serĉante la aŭroron

La vorto signifanta «pioĉoj», t.e. *piquetas* [elp.: piketas] venas el diminutivo de *pica* [elp.: pika] («lanco») kaj samtempe memorigas pri la ĉiutaga vorto signifanta «(birdo)beko», nome *pico* [elp.: piko].

En la hispana poezio, piedoj teorie ne gravas (gravas nur la silab-nombro kaj la akcentitaj silaboj), sed multaj grandaj tiulingvaj poetoj, ĉefe sub la giganta influo de Rubén Darío (1867-1916), ja atentas ankaŭ piedojn. La ritmo de ĉiu oksilabo en *Romanco pri la nigra tristo* postulas tradukon per kvar trokeoj, nome:

—o —o —o —o

—o —o —o —o

Ordinara tradukanto eble simple redonus la unuan verson laŭvorte, ĉar ĝi havas la bezonatan kvar-trokean strukturon kaj konservas la metaforon (pioĉoj = bekoj): *La pioĉoj de la kokoj*. La dua verso estas iom pli komplika, ĉar *fosas serĉante la aŭroron* ne plu estas kvar-trokea kaj enhavas ne ok sed naŭ silabojn. Ĉu apostrofe ŝanĝi ĝin al *fosas serĉante l' aŭroron*? Ĉu eble pli aŭdace *fosas serĉe de l' aŭroro*? Ĉu prefere senartikole *fosas serĉante aŭroron*? Nu, eble la dua solvo pli poeziecas. La rezulto de nia amatora tradukanto estus:

La pioĉoj de la kokoj
fosas serĉe de l' aŭroro

Ĝi certe ne sonas malbone — kvankam ni bedaŭrinde perdis la multajn aliteraciojn de la originalo (p bb + t dd + g kkk + lll rr + nn + sssss), kiuj iĝis nuraj (kk + lll rr + sss). Tia lama traduko pravigus la aserton de mia amiko. Cetere, la strukturo de romanco postulas rimon asonancan (nur vokalan) en ĉiu para verso:

Las piquetas de los gallos
cavan buscando la aurora,
cuando por el monte oscuro
baja Soledad Montoya.

Ni vidas, ke *aurora,* (finiĝanta per *ó-a*) asonance rimiĝas kun *Montoya* (same *ó-a*). Ĉar la fino de la kvara verso nepre estu *Montoya*, ni devas fini la duan verson de la esperanta versio ankaŭ per *ó-a*… Ĉu ni do refaru la duan verson en esperanto por fini ĝin per *aŭrora*? Nu, la afero komplikiĝas, kaj nia amatora tradukanto povus ankoraŭ longe cerbumi, anstataŭ serĉi la solvon de Fernando de Diego, kiun vidu post 20 linioj:

1
2
3
4
5
6
7
8
9
10
11
12
13
14
15
16
17
18
19
20

***Romanco pri la nigra tristo***

Pikaj bekoj de la kokoj
serĉe al aŭroro fosas,
kiam de obskura monto
venas Soledad Montoya.

Aliteracioj en la du unuaj versoj:

*Originalo*

p bb + t dd + g kkk + lll rr + nn + sssss

*Traduko*

pb + kkkk + ll rrr + sss

De Diego brile solvas la unuan verson per amaseto da aliteracioj, kiuj ja sugestas pikadon. La rim-problemon de la dua verso li solvas per postigo de la vorto *fosas*.

## Dua ekzemplo

Ni faru la saman ekzercon per du aliaj fragmentoj, eĉ se nur por pruvi, ke De Diego ne estas neologismo-krea monstro detruonta esperanton kaj bla-bla-bla, sed prefere senlaca kaj perfektiĝema rekreanto de belaĵoj, kiu ĉiam ravas nin per frazoj trafaj kaj precizaj. Kaj per solvoj insulte simplaj.

Demandite pri sia neologismemo, li diris en 1994:

> La plej granda parto de miaj neologismoj kuŝas sur la paĝoj de PIV jam de multaj jaroj. La neologismoj multiĝis kun la kresko kaj maturiĝo de esperanto, kaj se ili ĉesus aperi, la lingvo mortus senrimede de anemio kaj ankilozo. Mia utiligo de neologismoj povas ŝajni troa al samideanoj kun nesolida lingvo-scio, tamen mi ne verkas por ili, sed por esperantistoj, kiuj profunde posedas esperanton kaj amas nian beletron.

Jen fragmento el *La malfidela edzino*, kiu priskribas seksumadon:

> Aquella noche corrí
> el mejor de los caminos,
> montado en potra de nácar
> sin bridas y sin estribos.

En esperanta ortografio:

Akeja noĉe korri’
el mehor’ de los kaminos,
montado-en potra de nakar
sin bridas i sin estribos.

- *rr* = hispana forta *r*
- *montado-en* = la du silaboj *do-en* prononciĝas unusilabe

Laŭvorta traduko:

Tiun nokton mi kuris / trairis
la plej bonan el la vojoj,
rajdante perlamotan ĉevalinon
sen bridoj kaj piedingoj.

Ĉi tiu fragmento sidas meze de romanco. La elektita asonanca rimo en la antaŭaj versoj estas *í-o*, kaj la ritmo de ĉiu oksilabo denove kvar-trokeas (—o —o —o —o).

Ni provu per *ĉevalinon-bridoj*:

Tiun nokton mi trairis
rajde perlamotan ĉevalinon
la plej bonan el la vojoj
sen piedingoj kaj bridoj.

En la dua verso estas superfluaj silaboj kaj en la kvara verso la trokeoj fuŝas. La vorto anstataŭonta *perlamotan* devas esti dusilaba kaj sugesti la haŭtan glatecon de la partnerino: *konkan* do ne taŭgus. Ĉu eble jene per *ĉevalinon-piedingoj*?:

Tiun nokton mi trairis
rajde perlan ĉevalinon
la plej bonan el la vojoj
sen bridar' kaj piedingoj.

## Bonvolu legi la solvon de Fernando de Diego post nur 20 linioj:

1
2
3
4
5
6
7
8
9
10
11
12
13
14
15
16
17
18
19
20

***La malfidela edzino***

Tiunokte mi vojaĝis
sur perleca ĉevalino
la plej ravan el la vojoj
sen la selo kaj la bridoj.

## Aliteracioj:

### *Originalo*

ll rrr br tr tr + nnnnnnn + sssssss + kkkk + dddd t

*Traduko*

llllllll pl rrr br + nnnn + ssss + vvvv + ĉĝ

De Diego ne elektas *kuris* aŭ *trairis*, sed *vojaĝis*, mukte pli elvokiva. Same pri *ravan* anstataŭ *bonan*. Kaj li majstre ŝanĝas la pezan *piedingoj* al *selo*, ege pli bela kaj sonora vorto. Evidente, se la rajdanto vojaĝas sen selo, tio implicas, ke la piedingoj ankaŭ malaperis.

# Tria ekzemplo

Kaj jen la tria fragmento, nun el *Somnambula romanco*:

Ya suben los dos compadres
hacia las altas barandas.
Dejando un rastro de sangre.
Dejando un rastro de lágrimas.
Temblaban en los tejados
farolillos de hojalata.
Mil panderos de cristal
herían la madrugada.

En esperanta ortografio:

Ja suben los dos kompadres
asja las altas barandas.
Dehando un rrastro de sangre.
Dehando un rrastro de la-grimas.
Temblaban en los tehados
farolijos de-ohalata.
Mil panderos de kristal'
erian la madrugada.

- *rr* = hispana forta *r*
- *la-grimas* = la akcento falas sur la unuan silabon *la*.
- *de-ohalata* = la du silaboj *de-o* prononciĝas unusilabe

Laŭvorta traduko:

Jam supreniras la du kunbaptanoj / intimaj amikoj
al la altaj verandoj.
(Post)lasante spuron el sango.
(Post)lasante spuron el larmoj.

Tremis sur la tegmentoj
lantern(et)oj el lado.
Mil tamburinoj el kristalo
vundis la mateniĝon.

Ni vidas ke Lorca uzas sampoeme prezencon (*supreniras*) kaj paseon (*tremis*, *vundis*), kio estas tipa trajto de romancoj. Oni povas konsideri, ke la paseo valoras prezencon (aŭ inverse), ĉar romancoj kutime sentempas. En tiaj miks-tensaj poemoj, De Diego tre inteligente elektis traduki ĉiujn paseojn de *Cigana romancaro* per prezencoj.

Ĉi tiu fragmento sidas meze de romanco. La elektita asonanca rimo ĉi-foje estas *á-o*, kaj la ritmo de ĉiu oksilabo same kvar-trokeas (—o —o —o —o).

Ni provu per *verandaro-larmoj-lado-kristalo*:

Jam ascendas la amikoj
al la alta verandaro.
Postlasas spuron el sango.
Postlasas spuron el larmoj.
Tremas sur la tegmentoj
lanternetoj el lado.
Vundas la mateniĝon
mil tamburinoj el kristalo.

La versoj 5, 6, 7 tro mallongas kaj la verso 8 tro longas. Kompreneble, ankaŭ la trokeoj en tiu versoj estas farotaj. Kaj la trokeoj en la versoj 3, 4 ne bonas. Ni refaru la trokeojn en 3, 4 per *Malantaŭe, spur' el sango. / Malantaŭe, spur' el larmoj.* Aŭ eble per *Kaj postrestas spur' el sango. / Kaj postrestas spur' el*

*larmoj.*? Ankoraŭ: *Kaj post ili, spur' el sango. / Kaj post ili, spur' el larmoj.* La tri solvoj sonas malbelege, sed ni kuru antaŭen. Pluse, ni aldonu (tute amatorece) la kejlon *kaj* — eĉ trifoje! Kaj ni fajfu pri la ĝustaj trokeoj en la verso 5 kaj pri la kunpuŝiĝo de akcentoj en la verso 8! Ek! Jes ja! Esperanto estas tre fleksebla kaj eltenas ĉion, ĉu ne? Ja sufiĉas vidi kelkajn laŭ-dirajn tradukojn al nia kompatinda lingvo…

Jam ascendas la amikoj
al la alta verandaro.
Kaj post ili, spur' el sango.
Kaj post ili, spur' el larmoj.
Tremadas sur la tegmentoj
lanternetoj el fer-lado.
Kaj la mateniĝon vundas
tamburin-mil' el kristalo.

Ankoraŭ 20 linioj ĝis la redono de Fernando de Diego:

***Somnambula romanco***

La kompanoj jam ascendas
al la alta verandaro.
Gutas sango sur la vojo.
Sur la vojo gutas larmoj.
Tremas ade sur tegmentoj
lanternetoj el ferlado.
La matenan ruĝon vundas
mil tintiloj el kristalo.

## Aliteracioj:

*Originalo*

bbb p + ddddddddd ttt lt + g k + hhhh + llllllll lt + mmmm bl mp + nnnnnn nd nd nd nd + rrrrrr dr dr gr kr ngr str str + sssssssssssssssst

*Traduko*

dd tttttt st lt + gg k gm + llllllllllll lt + mmmm mp + nnnnn nd nd nd ng nt nt nt + rrrrrrrr kr tr + ssssssss sc + vvvv f

De Diego elektas ne *amikoj* sed *kompanoj*, vorto laŭsignife pli proksima al la originalo. La perlo en ĉi fragmento estas la genia kiasmo, per kiu li solvas la malfacilegajn versojn 3, 4: *Gutas X sur la vojo. / Sur la vojo gutas X.* La elekto *Tremas ade* anstataŭ *Tremadas* ankaŭ pli poeziecas, same kiel *La matenan ruĝon*

anstataŭ *(Kaj) la mateniĝon*. La lastaversan *tamburin*-problemon li solvas per la malpli longa kaj same sonora *tintiloj*.

## Kaj du citaĵoj

Mi volas fini per du citaĵoj el Lorca, kiuj bele montras ankaŭ la laboron de De Diego:

> Se veras, ke mi estas poeto dank' al Dio —aŭ dank' al la demono— ankaŭ veras, ke mi estas poeto dank' al tekniko kaj penado, kaj ĉar mi absolute konscias, kio estas poemo.

> Inspiro donas la bildon sed ne la veston. Kaj bildon oni vestu atentante (...) la kvaliton kaj la sonoron de l' vortoj.

PS.: Ĉu mia amiko trovis bona la esperantigon de la du unuaj versoj de *Romanco pri la nigra tristo*? Nu, li agnoskis, ke la rezulto taŭge spegulas ritmon kaj aliteraciojn, kaj ĝi do ne sonas malbele... «sed io mankas». Laŭ mia opinio, tio mankanta estis — lia nescipovo de esperanto.

# ANTAŬPAROLO DE WILLIAM AULD

Kiam ajn oni elnombras la elstarajn eŭropajn poetojn de la dudeka jarcento, la nomo de Federico García Lorca nepre aperas sur la listo. La titolo *Cigana romancaro* estas konata al ĉiu klera eŭropano. Kaj tamen la pensema kosmopolito rajtas iom miri: kiel poeto tiel hispane hispana, kies verkoj estas nur parte, kaj ne ĉiam adekvate, tradukitaj en aliajn lingvojn, povis akiri tian universalan reputacion? Ĝis kioma grado kontribuis al tio lia ĉarma personeco kaj lia tragika kaj bedaŭrinda morto en 1936? (Kaj tamen estas notinde, ke unu el liaj pli sukcesaj tradukintoj en la anglan estis poeto, kiu militis sur la naciista flanko dum la Fratmilito.) La kritiko skribas ekzemple: «Por lin kompreni, necesas koni lian patrujon, rande de Afriko, kaj senti sin hejme en la hispana poezia tradicio». Kaj tamen —kun aŭ sen la dirita kompreno— li estas admirata de Iberio ĝis Sovetunio, de Kalifornio ĝis Kaburbo.

Konfesinde, ankaŭ mi apartenas al tiuj, kiuj ĝis nun lin admiris pro kelkaj malmultaj kaj diverskvalitaj tradukoj; mi konis lin multe pli per la libroj skribitaj pri li ol per la verkoj skribitaj de

li. Ĉar ne mankas kritikaj libroj pri la poeto en la plimultaj lingvoj — libroj, kiuj donas ĉion escepte de la intima rilato kun la poemoj mem, kio konsistigas la solan malfalsan scion kaj la solan vere veran trezoron eterne valoran. La kompara literaturo estas stranga fako, kiu komplete baziĝas sur la lingvoscio; kaj ni ĉiuj emas akcepti opiniojn, kiujn ni ne kapablas vere taksi surbaze de propraj esploroj. Tiel estas —por tro multaj— ankaŭ pri García Lorca.

Tiuj pravas, kiuj atentigas pri la fundamenta hispaneco de liaj verkoj, en kiuj abundas figuroj ĉerpitaj el la fenomenaro tipe hispana. Sed la universala allogo de la poeto devenas malpli de la nacia fono, ol de la universaleco de liaj spertoj. Liaj ciganoj estas noblaj sovaĝuloj, moralecaj primitivuloj, kiuj reprezentas la fortojn de la vivo kaj la pasio kontraŭ tiuj de la morto. Lorca malŝatis la evoluantan civilizacion, kiu por li mortigis la homan spiriton, kaj li turnis sin ne nur al la primitivaj valoroj, sed ankaŭ al la tradiciaj kultur-rimedoj el la pasinteco de sia nacio, por himni la gravecon de la emocioj — emocioj ja universalecaj kaj tute ne mallarĝe regionaj. Lia sinteno renkontas simpatian reeĥon en multaj koroj en multaj landoj, kaj tial lia akceptiĝo en la vasta mondo.

Sed lia hispaneco estas tia kaj tioma, ke nur hispanlingvano loĝanta en la kulturo kaj tradicioj de la hispanlingva mondo kapablas lin riveli kaj interpreti por ni en plena aŭtentiko. Tio estas atuto en la mano de la Internacia Lingvo, ke ĝi, laŭ sia

naturo mem, estas la perfekta perilo de literaturo por la celoj de la kompara literaturo, kaj por la tutmonda diskonigo de literaturaj verkoj; kaj ĝia naturo kondukas ĝis tio, ke normale tradukas hispano hispanon, franco francon, japano japanon — inversigo de la situacio en la nacilingva kadro. Rezultiĝas, ĝenerale, tradukoj pli adekvataj ol la nacilingvaj.

Kondiĉe, kompreneble, ke la tradukanto posedas adekvatan talenton.

Ĝis lastatempe, la —relative malmultaj— poemtradukoj el la hispana ne multe kontentigis laŭ la altaj kriterioj starigitaj de la majstrotradukantoj: Zamenhof, Grabowski, Kalocsay, Waringhien, k.m.a. Ŝajnas, ke en Hispanujo mankis la adekvataj talentoj. Ŝajnis, eble, ke la specialaĵoj de la hispana metriko starigas apartajn problemojn, nesolveblajn laŭ la eltrovitaj rimedoj de la esperanta prozodio? Martin Fierro, en traduko de Sonnenfeld, estis eble la unua signo pri nova etapo; sed ĉu ĝi estis restonta unika escepto?

Tute subite, iom antaŭ la fino de 1969, aperis en *Norda Prismo* kelkaj lirikoj tradukitaj de Fernando de Diego; kaj fine de 1969, de la sama tradukinto, *La lando de Alvargonzález*. Tuj oni komprenis, ke ankaŭ la hispana poezio povas esti transdonita per Esperanto. F. de Diego montriĝis unuaranga tradukanto kaj adekvata talento. Lia ĉefa teĥnika triumfo estis redonado de la asonancoj, sen kiu la traduko de romancoj povis esti nur tre proksimuma; per *La lando de Alvargonzález* li definitive

hejmigis ĉe ni tiun specialan formon, kaj finfine sentigis al ni la romancon kiel ion specialan kaj apartan.

Kio pli nature do, ol ke ni atendus de li la tradukon de *Cigana romancaro*? Kaj kio pli ĝojiga, ol ke li ĝin donis al ni? Kun la plej profunda plezuro mi povis finfine, pere de tiu ĉi aŭtoritata, por ne diri genia, traduko, frandi la veran guston de Lorca. Ne nur tio, sed per siaj enkonduko, komentoj kaj notoj —kiuj laŭ mia scio ekzistas nek en eldonoj en la hispana, nek en eldonoj en la ceteraj naciaj lingvoj— li malfermas la verkon al aprezo pli kompleta eĉ de tiuj, kiuj ĝis nun ne konis la hispanan poezian tradicion. Post Ŝekspiro, Bodlero, Hajno, jen la esperanta (kaj apenaŭ esperita!) Lorca: triumfo de la Internacia Lingvo!

# ENKONDUKO

## Ĝenerala superrigardo

La apero, en la jaro 1928, de *Cigana romancaro* kaŭzis tujan sensacion en la hispanlingva mondo. La furora libro ravis ne nur la membrojn de elitaj poeziaj rondoj, sed ankaŭ la koron de homoj ĝenerale indiferentaj al estetikaj aŭ lirikaj zorgoj. Analfabetaj vilaĝanoj kaj simplaj laboristoj parkeris kaj deklamis, sen arto sed kun ardo, versojn de la libro, kies pliparton ili ne komprenis.

Federico García Lorca (1898-1936) atingis per siaj romancoj kion nur la elektitoj de la dioj gustumas: la unuaniman aplaŭdon de ĉiuj tavoloj de tuta popolo. Kun sia intuo kaj instinkto de absoluta poeto, la apenaŭ tridek-jara andaluzo plene sukcesis doni formon al verko de mirinda poezia sintezo, kien distiliĝis, en sorĉa kombino, kaj en perfektaj dozoj, esoteraj metaforoj apud refrenoj de popolaj kanzonoj; altfluga inspiro de versoj nedireble subtilaj apud onomatopeoj kaj kapricaj ripetoj troveblaj preskaŭ laŭlitere en koploj kaj lulkantoj de longa tradicio. Ĉiu do, indiferente ĉu klera aŭ needukita, renkontis en la poezio de García Lorca specialan parcelon de belo.

La romanco, poemo de nedifinita longo ĝenerale el versoj oksilabaj kun asonanca rimo en la paraj, havas longegan tradicion en la hispana poezio; ĝi originis jam en la fruaj tempoj de la lingvo (kiam la kastila komencis balbuti el la kokono de la

latina) kaj adaptiĝas plej facile al la naturo kaj strukturo de la hispana. Ĝi, same kiel la koploj, ŝajnas spontane flui de la popolo, kaj ne por nenio García Lorca elektis la popularan romancon kiel veston de sia plej fama libro.

La poeto mem diras:

> De la jaro 1919, en la epoko de miaj unuaj paŝoj en la poezio, mi cerbumis pri la formo de la romanco, ĉar mi komprenis, ke tiu estas la vazo, kiu pli bone adaptiĝus al mia sentemo (…) La tradicia romanco estis ĉiam rakonta, kaj tio donis ĉarmon al ĝia fizionomio, ĉar, kiam ĝi iĝis lirika, sen eĥo de anekdoto, ĝi aliiĝis en kanzonon. Mi volis kunfandi la romancon rakontan kaj la lirikan, strebante, ke ĉiu konservu sian karakteron, kaj la pozitiva rezulto de tiu strebo vidiĝas en kelkaj poemoj de *Cigana romancaro*, ekzemple en *Somnambula romanco*.

Federico García Lorca plene sukcesis tiurilate, sed tio ne tute klarigas la kialon de la universala aklamo al lia verko. Estis ĉefe la nesuperebla kalibro de lia liriko kaj lia maniero interpreti la eternajn temojn de vivo, morto, angoro kaj amo, viditajn per okuloj de andaluza temperamento, kio metis lin inter la unuaj figuroj de la tutmonda poezio.

Li parolu denove:

> La libro, en sia tuto, kvankam ĝi ricevas la nomon cigana, estas la poemo de Andaluzio, kaj mi nomas ĝin cigana, ĉar la ciganoj estas plej altaj, plej profundaj, plej aristokratecaj homoj de mia lando, plej reprezentaj de ties est-maniero kaj gardantoj de la fajro, la sango kaj la alfabeto de la vero andaluza kaj universala. Do la libro spegulas Andaluzion kun ties ciganoj, ĉevaloj, ĉefanĝeloj, planedoj, brizoj juda kaj romana, riveroj, murdoj, la vulgaran noton de kontrabandistoj kaj la noton ĉielan de nudaj infanoj de Córdoba, kiuj mokas sanktan Rafaelon. Libro, kie apenaŭ aperas la Andaluzio, kiun oni vidas, sed kie tremas la Andaluzio nevidata. Libro, mi jam diru, nepitoreska, nefolklora, nekonvencia, kie ne troviĝas tipaj kostumoj, nek toreadoraj vestoj (...) kie la figuroj moviĝas sur fonoj miljare oldaj, kaj kie ekzistas nur unu sola protagonisto, granda kaj obskura, kia ĉielo somera: la Tristo, kiu sin filtras ĝis la medolo de la ostoj kaj ĝis la suko de la arboj, kaj havas nenion komunan kun la melankolio nek kun la nostalgio, nek kun ia aflikto aŭ doloro de la animo, ĉar temas pri sento pli ĉiela ol tera: tristo andaluza, kiu estas lukto de amoplena inteligento kontraŭ la nekomprenebla mistero ĝin ĉirkaŭanta.

*Cigana romancaro* traktas tion kaj krome multon alian. La relative primitivaj mensostato kaj pensmaniero de la ciganoj agordiĝas kun la propraj instinktoj kaj tendencoj de García

Lorca. La vivo natura kaj primara, la atavismaj timoj, la senbridaj pasioj de la ciganoj, la obsedo pri la morto kaj ties avangardo de sinistraj tentakloj sidas, efektive aŭ sopire, en la spirito de la poeto. Kaj kiel vera andaluzo li kaŝas sub rideto, sub petolaj kaj leĝeraj versoj, la nedifineblan Triston ciganan, la mil satelitojn kaj heroldojn de la morto, la Morton mem, kiu ne ĉiam sin prezentas nur kun sia horora falĉilo, sed ankaŭ kun la allogo de la eterna ripozo.

La versojn de García Lorca oni povus ofte kompari kun fenomeno de senkarniĝo, kvazaŭ ni admirus la gracie proporciajn membrojn kaj korpon de bela junulino, kaj iom post iom ŝia haŭto diafaniĝus vidigante la skeleton kaj la vakan rikanon de la kranio sub ŝiaj ruĝaj kaj sukaj lipoj. Jen du ekzemploj ne apartenantaj al *Cigana romancaro*:

***Granada kaj 1850***

De mia ĉambro
aŭdiĝas font[1].
Radio de la suno
kaj vitolaŭba ŝos.

La du samtempe
celas al mia propra kor.
En la ciel' aŭgusta
la nuboj drivas for.

Mi pensas min senpensa
interne de la font.

***Lunduono***

Iras luno sur la akvo
(kiel paca la ĉielo!).

Ĝi tre malrapide falĉas
oldan tremon de l' rivero,
kaj samtempe juna branĉo
prenas ĝin por speguleto.

Tie, interalie, tedo pri la vivo kaj sopiro al la morto fluas, kun la morna denso de la esencaj konstatoj, inter la leĝeraj kaj unuavide naivaj linioj.

García Lorca, kiu sentas sin fremda al la vivo regata de la frida maŝinismo, de la racio, havas simpation al tiuj liberaj teridoj: la ciganoj. Kion li aludas en *Cigana romancaro* kaj en antaŭaj poemoj, tion li diskrias senmaske kaj pasie en postaj verkoj, ĉefe en *Poeto en Nov-Jorko*, kie li korŝire esprimas sian abomenon al civilizo kruela kaj mekanika. Tiu anarkismema trajto de García Lorca, tiu instinkta malŝato al la leĝoj, konvencioj kaj formalaĵoj trovas kunsentan eĥon ankaŭ en ĉiuj hispanlingvaj landoj, pli proksimaj al Dionizo ol la Apolono, pli fervoraj por la spontano ol por la normo.

Lia polemika *Romanco pri la hispana Civil-gvardio* estas ne tiom akuzo kontraŭ difinita leĝotruda institucio, kiom atako kontraŭ la sufoke racia mondo plena de reguloj kaj limigoj. La civil-gvardio nur simbolas tiun mondon, kiu blinde masakras la liberajn kaj instinktajn impulsojn de la senartifikaj homoj.

García Lorca scias tamen, ke ideala, edena vivo nek ekzistas nek povas ekzisti; liaj aspiroj kaj inklinoj estas do neefektivigeblaj, kaj tio kondukas lin rekte al la nigra konkludo de la finaj versoj de tiu romanco:

> Ho, la urbo de ciganoj,
> sopirata se vidita!
> Serĉu ĝin en mia frunto.
> Lun' en sablon sin implikas.

En rondoj ĉefe eksterlandaj oni opiniis la romancaron ia glorigo de la ciganoj, ia senkondiĉa laŭdo al subpremata raso. Sed García Lorca laŭdas nur tion ciganan, kion li povas oponi kontraŭ la mondo de la reguloj, ĉar li tre bone sciis, ke ĉe la ciganoj, apud ties primitivismo liberama kaj instinkta, kunekzistas tradicioj kaj tribaj leĝoj eĉ pli rigoraj kaj arbitraj ol la eksterciganaj, kaj ke ili vivas submetitaj al aliaj superstiĉoj kaj limigoj. La poeto mem deklaris iam: «Mia ciganismo estas nur literatura temo kaj unu libro. Nenio pli».

## La dua plano de García Lorca

Kiel aliaj grandaj poetoj, García Lorca kreas al si apartan terminologion; pli ĝuste, li prenas nombron da ordinaraj vortoj kaj al ties ĝenerala, surfaca senco li aldonas apartajn subsencojn. Resume, li faras simbolojn; kelkajn li prenas el la tradicia poezio; aliaj estas konataj nur en lia andaluza lando, sed pliparte originas el li mem. Sen antaŭa scio de tiaj simboloj, oni trovas pli kruta la vojon al la kerno de la nefacile alirebla mondo de la poeto. Tamen García Lorca genie verŝas subtilan ĉarmon sur la periferion de siaj poemoj, do ankaŭ la irantoj laŭ la eksteraj remparoj gustumas ne neglektindan porcion de belo kaj sento.

Denove parolas la poeto:

> Iam mi demandis al kelnero leginta kelkajn romancojn:
> —Kion signifas… (kaj ĉi tie mi montris metaforon).
> —Mi ne scias —respondis la kelnero.
> —Ĉu vi ĝin ŝatis?
> —Jes…

La kelnero ne kaptis la sencon de la versoj, sed sentis ilian magnetan tremon kaj la sugeston de ilia muziko.

La unua granda simbolo de García Lorca estas la luno. Ĉe li la luno ne estas la luno de la romantikuloj nek la luno de la

tradicia poezio, sed potenco maligna, kiu heroldas la morton, aŭ dissolvas la individuan vivon en la nokton sen kantoj kaj konscio de la kosmo. Jam de la unua romanco de la libro, la luno enrampas kvazaŭ en feŭdon propran kaj trudas sin.

La sinistran ĉeeston de la luno ordinare akompanas aliaj mortaŭguraj signoj. Unue la koloroj; la verda havas ĉe García Lorca kuriozan simbolikon. Ĝi ne reprezentas vivon kaj esperon, sed amaron, triston, angoron, pereon. En lia Andaluzio oni asocias la verdon de la citronoj kun la amaro de ilia suko, kaj sendube García Lorca ĉerpis de tio ankaŭ la aliajn parencajn ekvivalentojn.

Per la komenca verso de sia fama *Somnambula romanco*: «Verda, ĝin mi volas verda», li anoncas la tragikan karakteron de la poemo, kaj per la sekvantaj ripetoj de la verso li substrekas la kreskantan sieĝon de la obskuraj fortoj. La verdigo de aliaj elementoj: vento, karno, igas ankoraŭ pli densa la preman atmosferon de la romanco.

García Lorca donas sinistrajn signifojn ankaŭ al la koloroj blanka, flava kaj ĝenerale al ĉio prezentanta tiujn tonojn, dum la koloroj blua, oranĝa, ruĝa, simbolas vivon, amon, feliĉon.

Ankaŭ la fruktoj kaj arboj de García Lorca estas ŝarĝitaj de simboliko kaj ĝenerale esprimas tion, kion iliaj respektivaj koloroj reprezentas. Malfeliĉon aŭ pereon signas olivo, olivarbo, lilio, figarbo, jasmeno, migdalo, sunfloro, cikuto, urtiko, nardo

(tuberosa floro), rubuso, helikrizo aŭ imortelo… dum dalio, magnolio, rozo, laŭro, malvo, dianto, ĉerizo… signifas amon kaj vivoĝojon. En la jena poemo García Lorca mirinde manipulas la simbolikon de floroj kaj koloroj:

### *Eta arbo, arbo eta*

Eta arbo, arbo eta
seka, verda.

La knabino bel-vizaĝa
sola la olivojn plukis,
dum la vento, tur-fianĉo,
ĉirkaŭzone ŝin brakumas.

Pasas kvar rajdantaj viroj
sur ĉevaloj andaluzaj,
en mantelo nigra, longa,
en kostumo verda, blua.
«Venu Córdoban, knabino».
Ilin ŝi preteraŭskultas.

Pasas tri toreadoroj
junaj kaj talio-suplaj,
en kostum' oranĝo-tona,
kun arĝenta glavo nuda.
«Venu Sevillan, knabino».
Ilin ŝi preteraŭskultas.

Kiam la vespero iĝas
violeta hel' difuza,
pasas juna viro, portas
rozojn apud mirtoj lunaj.
«Venu Granadan, knabino».
Kaj ŝi lin preteraŭskultas.

La knabino bel-vizaĝa
plue la olivojn plukas,
dum la griza brako venta

ĉirkaŭzone sin brakumas.

Eta arbo, arbo eta
seka, verda.

La poemo ŝajnas enteni nur aminvitojn de junuloj al knabino; sed se oni iom atentas, oni vidas, ke la tuta atmosfero estas nereala kaj ambigue simbola, kaj ke esence oni ĉeestas defilon de simboloj kaj malbonaŭguraj signoj. La invitoj do estas sinistraj, kaj oni komprenas, ke la knabino ilin rifuzas.

La romantika junulo de Granada portas «rozojn apud mirtoj lunaj», tio estas, amon kaj feliĉon vualitajn en funebraj antaŭsentoj. La mirto, ĉi-okaze rilatigita kun la luno, perdas sian tradician sencon erotikan kaj akcentas sian malfeliĉotrudan simbolikon, kiu obskurigas ankaŭ la vivamajn rozojn.

La toreadoroj de Sevilla iras:

en kostum' oranĝo-tona,
kun arĝenta glavo nuda.

Oranĝo —emblemo de amo kaj feliĉo kaj aludo al la oranĝarbaroj de Sevilla— kontrastas kun la armilo blanka. La sama kontrasto aperas ĉe la rajdantoj de Córdoba:

en mantelo nigra, longa,
en kostumo verda, blua.

kaj, kvankam la knabino saĝe rifuzas ĉies inviton, tamen en la leganto restas ia tremo de angoro pri ŝia futuro, ĉar la verda

koloro metas sian sinistran tonon, kiam ŝi

plue la *olivojn* plukas,

Du versoj de *Romanco pri la hispana Civil-gvardio* rivelas ĝis kia pinto de genio flugas la inspiro de García Lorca:

Ĉe la luno, kalabaso
kun la marmelad' ĉeriza.

Apud la mortanonca luno en la fono, la kalabaso kun sia sinistra flava koloro enfermas en si la vivon liberan kaj ĝojan, kiun reprezentas la ruĝo de la ĉerizoj, kaj aŭguras tiel la ekstermon kaj masakron de la ideala urbo cigana.

García Lorca do simultane laboras super du planoj. La ekstera, anekdota plano estas jam belega per si mem, kaj krome ĝin briligas eĥoj de popolaj koploj kaj diraĵoj troveblaj ankaŭ en tradiciaj kanzonoj. La interna plano, pli densa kaj transcenda, pli pure poezia, montriĝas nur per la zorga interpreto de simboloj, alegorioj, metaforoj kaj aludoj.

García Lorca konservis ankoraŭ en sia matura aĝo la freŝajn impresojn de la infanaj jaroj, kiam la mondo ĉirkaŭe plenas je nedireblaj kaj timigaj misteroj, kiam la flustro de folioj, la siblo de strigo, la tenebro nokta metas en la koron la neracian hororon, de kiu la infanetoj volas eskapi eĉ kaŝante sian kapon sub la litotukon. La poeto parte ĉerpas sian inspiron el la profunda puto, kie kuŝas ankoraŭ la sorĉa akvo de lia infaneco,

kies instinktan tremon kaj vizion, plenan je svagaj minacoj, li transplantas al siaj romancoj. En la romancoj de García Lorca, kiel en la menso de la infanoj kaj de la primitivuloj, la naturo, la objektoj havas propran vivon kaj manifestas sian emocion kvazaŭ temus pri efektivaj personoj. Cetere, ankaŭ en la tradiciaj kantoj kaj koploj andaluzaj troveblas simila partopreno de la naturo en la homaj eventoj.

Kiam en *Preciosa kaj la vento* ĉi lasta, en preskaŭ homa personiĝo, persekutas la ciganinon, tiam la streĉe atendanta ĉirkaŭo reagas diversmaniere:

> Palo kovras oliv-arbojn.
> Grunton maro plaŭde knedas.

En *Duelo* la nokto iel partoprenas la lukton de la viroj:

> Nokto, fola de fig-arboj
> kaj de varmaj flustroj ŝvela,
> ĝis femuroj pik-vunditaj
> de l' rajdantoj fale svenas.

Kelkfoje en la kompleksa mondo metafora de la poeto, li aludas tiajn elementojn de la naturo per belaj kvankam ne malofte perpleksigaj alegorioj. En *Morto de Antoñito Camborio* legiĝas:

> Jam anĝelo danda metas
> sian kapon sur muslin,
> dum aliaj, lacaj ruĝi,
> verŝas lumon per lumil.

Ĉi tiuj versoj donis originon al abundaj miskomprenoj kaj misinterpretoj. Oni riproĉis al García Lorca, ke li ne identiĝis kun la tragedio de siaj propraj kreitoj, ĉar li permesis al si la ŝercon kontraŭetose intervenigi frivolajn anĝelojn en tragika momento de la romanco. Krome, pro la multampleksa signifo de la hispana refleksivo, oni opiniis, ke la anĝelo metis sur muslinon ne sian kapon, sed la kapon de la ĵus mortinta Antoñito Camborio.

Tia ne estas la kazo. Kio kaŝiĝas sur la dua plano de la poemo senvalorigas tiun hipotezon. García Lorca tenas sin perfekte serioza al siaj kreitoj; eble li volis iom ŝerceti, sed je la kosto nur de la legantoj, ĉar liaj anĝeloj ne estas veraj anĝeloj, sed nur *nuboj*. En ĉiuj romancoj, escepte en *Martirigo de santa Olalla*, la *anĝeloj* signifas nur nubojn.

Ni legu en *San Miguel*:

> La okulojn plumbajn fermas
> la ĉiel' el blankaj bovoj
> kaj al duon-ombroj metas
> finon per komencaj koroj.

García Lorca denove maskas la nubojn sed ĉi-foje sub la nomo de bovoj. Kiel interpreti la suprajn versojn? Proksimume jene: la aŭroro iom post iom lumigas la blankajn nubojn, kiuj, ĉe la proceso, perdas la obskurajn partojn kaj akiras ruĝan reflekton super la reduktiĝantaj ombroj de la tero.

La akvo havas kompleksan simbolikon en la poezio de García Lorca. La akvo, origino kaj fonto de la vivo, estas ankaŭ sekreta alvoko dissolviĝi en la nenion. La akvo flua, viva, de la riveroj kaj la akvo ĉiam moviĝanta de la maro reprezentus la flankon pozitivan, kvankam en okazoj la maro kaj la *amara maro* implicus la triston nedifineblan kaj la aflikton, kiuj sufokas kaj konsumas. La akvo stagna en putoj kaj cisternoj simbolus la kontraŭan poluson, t. e. la aspekton negativan.

Apud la vortoj jam menciitaj, jen listo de aliaj aperantaj en *Cigana romancaro*, kiuj per si mem, aŭ per la kunteksto, aŭ kombinitaj en la frazoj enkondukas tion obskuran: minacon, preman antaŭsenton, indikaĵon de morto, rifuzon, foreston.

Bestoj: serpento, kolombo, najtingalo, ĉevalo (ambivalenca).

Objektoj kaj iloj: lumilo, kandelo, tranĉilo, glavo, sago, martelo, tintilo, ponardo (ĉio akra), tondilo, amboso.

Konstruaĵoj: arko, balkono, verando, alkovo, koridoro.

Elementoj kaj aspektoj de la naturo: sablo, kalko, karbo, cindro, kristalo, kupro, dezerto, glacio, lado, fumo, stelo, lumo, flamo, marmoro, nebulo, neĝo, ŝtono, roko, herbo, arĝento, salo, gipso, metaloj (ĝenerale).

Aliaj vortoj malfacile klasifikeblaj: rajdanto (ambivalenca), kapoto, klamado, kruco, ligno, rumoro, inko, sulko, ombro, silento, hararo, mateniĝo, nordo.

## La metaforismo

Ĉirkaŭ la jaro 1920 la hispanan poezion transformis renoviga ŝanĝo. La eĥo de eksterlandaj ismoj —de futurismo ĝis dadaismo— komencis resoni en Hispanujo. Ilia influo baldaŭ fariĝis decida. Unu el la karakterizaĵoj de la nova poezio konsistis en la superrego de la metaforo. García Lorca, kun alia granda poeto hispana, Rafael Alberti, estas la plej elstara reprezentanto de la metaforismo, kaj liaj bildoj, ĉiam plenaj de belo kaj de altega poezia inspiro, trastebas la tutan *Ciganan romancaron*. Al tiu enmodiĝo de la metaforo kontribuis la influo de la gongorismo, kiun García Lorca aparte studis kaj komentis. La spirito de Góngora klare videblas en la romancoj *Martirigo de santa Olalla* kaj *Tamar kaj Amnon*.

Jen kiel García Lorca metafore priskribas la moviĝon de branĉoj de plorsalikoj super akvo:

> Sur speguloj plorsingultas
> dancistinoj sentaliaj.

aŭ aspekton de la torturo al santa Olalla:

> Ŝian tutan dorson kovras
> miloj da arbetoj sangaj,
> kies humidec' oponas
> al la bisturioj flamaj.

aŭ la poioman blankiĝon de urbo sub la neĝo:

El inkujoj de la urboj
sin elverŝas inko lanta.

aŭ la sangon fluantan sur la haŭto de Tamar:

kaj koraloj varmaj skizas
rojojn sur blondeta mapo.

aŭ la ondojn de la maro, kiuj leviĝante formas kapricajn figurojn:

La ciganoj de la akvo
por sin distri staren metas
laŭbojn el molusko-konkoj
kaj el pino-branĉoj verdaj.

aŭ la blovon de zefiro inter ruinoj sub stela ĉielo:

Ladpetaloj rompiĝemaj
brode garnas grizon puran
de zefiro disstreĉita
super triumf-arkoj rubaj.

aŭ furiozan, subitan ventofrapon kontraŭ plorsalikoj, kies longaj branĉoj interplektiĝas kaj veas pro la vento:

Ĉe-riveraj oldulinoj
ploras baze de la monto
dum minuto neirebla
da hararoj kaj da nomoj.

## Grupigo de la romancoj

La dek ok romancojn de la libro oni povas klasifiki en kvar grupojn.

En la unua staras la romancoj anekdotaj, t. e. la pecoj, kies intrigoj, simple prezentas al ni la liberan instinkton de la ciganoj, kiuj polarizas sin al la du ekstremoj de morto kaj volupto. En ĉi tiu grupo, la plej alirebla kaj populara, surface belega sed ne tre profunda, troviĝas *Duelo*, *La malfidela edzino*, *Aresto de Antoñito Camborio*, *Morto de Antoñito Camborio* kaj parte *Romanco pri la hispana Civil-gvardio* kaj *Somnambula romanco*.

En la kvar unuaj romancoj García Lorca danĝere proksimiĝas al tiu strasa folklorismo, kiun li ĉiam abomenis. Sed ilin savas lia suverena arto.

La duan grupon formas la trio de sanktuloj: san Miguel, san Rafael kaj san Gabriel, patronoj respektive de Granada, Córdoba kaj Sevilla. García Lorca per pli ellaborita, densa lingvo, manipulas la sanktulojn kaj ties cirkonstancojn por riveli la intiman estmanieron de la tri famaj andaluzaj urboj: la gracion, spriton kaj gajon de Sevilla kun ties «tristo de subtera fluo»; la melankolion kaj vesperkrepuskan tonon de Granada, urbo kun la okuloj turnitaj al la nostalgio kaj al la paseo; la karakteron asketan, romanan, antibarokan kaj antimaŭran de

Córdoba, kie, pli ol la kalifoj, postvivas la figuro de Seneko kaj ties severa etiko.

*Romanco pri la luno, luno*, *Preciosa kaj la vento*, *Somnambula romanco*, *La cigana monaĥino*, *Romanco pri la nigra tristo*, *Mortinta de amo*, *Romanco pri la amar-sorta* kaj *Romanco pri la hispana Civil-gvardio* formas la plej transcendan, belan kaj inspiritan grupon de la libro. Jen la mondo de la superstiĉo, de la halucino, de la angoro, de la nevideblaj teruroj, kiuj kun silentaj flugiloj sieĝas la vivon koropreme. La iluzio, la amo, kaj la espero apenaŭ povas manifestiĝi, ĉar ĉion paralizas kaj nuligas la obskuraj fortoj. La romancoj jam ne plu estas specife ciganaj: ili reflektas, laŭ la vortoj mem de García Lorca, *la veron universalan*.

Sub la rubriko *Tri historiaj romancoj* staras la lasta grupo de la libro. Temas pri *Moko pri don Pedro sur ĉevalo*, *Martirigo de santa Olalla* kaj *Tamar kaj Amnon*.

Nomi historia la pecon pri don Pedro ŝajnas nura kaprico de García Lorca, ĉar li portretas nenion historian, eĉ nenion realan en la poemo, kiu krome ne prezentas la saman forman strukturon de la aliaj romancoj kaj rivelas evidentan influon superrealisman. Kelkaj eruditoj ligas la pecon pri don Pedro al tradicia popolkanto iam glosita de Lope de Vega: *La kavaliro de Olmedo*.

En *Moko pri don Pedro sur ĉevalo*, García Lorca akumulas la simbolojn de angoro kaj morto. Kiel belege kaj profunde li pentras per nuraj du versoj la nerevokeblan, mizeran destinon de la homo!

> Maristo, ĉe la sudo.
> Kaj ĉe la nordo, stelo.

La kombino de simboloj kaj rafinitaj metaforoj kune kun refrenoj kaj versoj de popola deveno donis kiel rezulton la fenomenon de libro, kiu absolute hispana en sia spirito kaj en sia formo ĝuas tamen universalan aklamon. Ne mirinde, ĉar finfine identaj esperoj kaj timoj sidas en ĉiulandaj homoj, kaj kiam la intuo kaj la sento de genia poeto sukcesas profundiĝi ĝis la plej subtila tremo de nia koro, tiam li tuŝas ne apartan koron de gento aŭ nacio, sed la samesencan koron de la tuta homaro.

Fernando de Diego

1 En la originala eldono ne aperas apostrofoj por montri la forigon de vokaloj, kiam tio okazas en la versofino. En ĉi bita eldono, ni respektas la volon de la aŭtoro. Tamen, ĉi poemo aperas en *Sentempa simfonio* (1987) laŭregule apostrofita.

# CIGANA ROMANCARO

# Romanco pri la luno, luno

Al Conchita García Lorca

Al forĝejo luno venis
en la krinolin' el nardoj[2].
Ŝin la knabo mire miras.
Ŝin ja miras li sen paŭzo.
En aero sentovibra
ŝi agitas siajn brakojn
kaj, volupta, pura, montras
mamojn el rigida stano.
—Fuĝu, luno, luno, luno,
se revenos la ciganoj,
vian koron ili turnos
je orel- kaj fingr-ornamoj.
—Knabo, lasu, ke mi dancu.
Kiam venos la ciganoj,
surambose vi jam kuŝos
kun fermita okulparo.
—Fuĝu, luno, luno, luno,
mi jam aŭdas la ĉevalojn.
—Knabo, lasu min, ne tretu
mian amelitan blankon.

La rajdanto[3] proksimiĝas
tamburante l' ebenaĵon.
Jam la knabo ĉe l' amboso
fermis sian okulparon.

Tra oliv-arbaro venas,
bronzaj, lacaj, la ciganoj.
Kun palpebroj dorme pezaj
kaj suprenklinitaj kapoj.

Ve, la siblo de la strigo!
Kiel siblas ĝi en arbo!
Alte ŝovas sin la luno

kun knabeto ĉe la mano.

Nun en la forĝejo ploras,
plende krias la ciganoj.
Tie vento vigle viglas.
Tie viglas ĝi sen paŭzo.

# Preciosa kaj la vento

Al Dámaso Alonso

Sur vojeto amfibia
el kristal' kaj laŭro densa,
Preciosa ire frapas
sian lunon pergamenan.
De la monotona sono
la silento firmamenta
fuĝas maron, kies nokto
zumas, batas fiŝoplena.
La karabenistoj[4] dormas
ĉe postenoj montokrestaj
kaj la blankajn domojn gardas,
kie angloj loĝe restas.
La ciganoj de la akvo
por sin distri staren metas
laŭbojn el molusko-konkoj
kaj el pinobranĉoj verdaj.

*

Preciosa ire frapas
sian lunon pergamenan,
kaj la vento, ĉiam vigla,
ŝin vidante, sin eklevas.
Sankta Kristoforo nuda,
de ĉielaj langoj plena,
ŝin rigardas, kaj tre dolĉe
ludas fluton neĉeestan.

—Nu, knabino, vian jupon
levos mi, se vi permesas.
Miaj oldaj fingroj palpos
vian bluan rozon ventran.

Kuras ŝi; sen fari halton

sian tamburinon ĵetas.
Kun tre longa glavo arda
ŝin la virovento sekvas.

Palo kovras olivarbojn.
Grunton maro plaŭde knedas.
Sonas la flutetoj ombraj
kaj la plata gongo neĝa.

Preciosa, nu, pli kuru!
Fuĝu de la vento verda!
Preciosa, nu, pli kuru
kaj atentu, ke li venas!
Satiruso de la steloj
subaj kaj kun langoj helaj.

*

Preciosa terurite
en la domon tuj sin pelas,
kiun alte trans la pinoj
la konsulo angla tenas.

Alarmite de la krioj,
tri karabenistoj venas
en kapotoj striktaj, nigraj
kaj kun ĉapoj fruntopremaj.

Al la ciganino l’ anglo
varman lakton tuj prezentas,
ankaŭ glason da viskio,
sed ĉi-lastan ŝi ne prenas.

Kaj dum ŝi rakontas plore
sian aventuron streĉan,
la kolera vento mordas
la tegmenton griz-ardezan.

# Duelo

Al Rafael Méndez

En la mezo de ravino
la tranĉiloj Albacetaj[5]
same kiel fiŝoj brilas,
de rivala sango belas.
Dura lumo de lud-karto
akra-verde eldesegnas
la konturon de rajdantoj
sur ĉevaloj koleregaj.
Inter olivarbobranĉoj
du virinoj oldaj ĝemas.
La sovaĝa batal-taŭro
sur la muroj disimpetas.
Kaj anĝeloj nigraj portas
poŝajn tukojn, akvon neĝan.
Nigraj, kun flugiloj grandaj
el tranĉiloj Albacetaj.
Juan Antonio de Montilla
rule falas, morte restas
kun granato en la frunto
kaj kun korpo lili-plena.
Sur la vojo de la morto
fajra kruco nun sin trenas.

*

Gvardianoj[6] kaj juĝisto
inter olivarboj venas.
En silento glitas sango
per serpenta fluo ĝema.
—Gvardianoj, nu, ĉi tie
rutinaĵon vi atestas.
Mortis kvar Romanaj viroj,
ankaŭ kvin Kartago-regnaj.[7]

*

Nokto, fola de figarboj
kaj de varmaj flustroj ŝvela,
ĝis femuroj pik-vunditaj
de l’ rajdantoj fale svenas.
Kaj anĝeloj nigraj flugas
en krepusko okcidenta.
Nigraj, kun harplektoj longaj
kaj kun kor’ oliv-olea.

# Somnambula romanco

Al Gloria Giner kaj Francisco de los Ríos

Verda, ĝin mi volas verda.
Verda vento. Verdaj branĉoj.
La ĉevalo sur la monto
kaj la ŝipo sur la maro.
Kun la ombro ĉe la zono
kaj arĝento-frida gapo,
verda karno, haroj verdaj,
pensas ŝi en la verando.
Verda, ĝin mi volas verda.
Sub cigana lunoklaro
la ĉirkaŭo ŝin observas,
sed ŝi vidas nur la vakon.

*

Verda, ĝin mi volas verda.
Grandaj steloj el gel-grajnoj
venas kun la fiŝo ombra
en aŭrora avangardo.
La figarboj frotas venton
per la smirgo de la branĉoj,
kaj la monto foineca
sin hirtigas per agavoj.
Kiu venos...? Kaj de kie...?
Dume ŝi en la verando,
verda karno, haroj verdaj,
pensas pri amara maro.
—Mi dezirus kun ŝi ŝanĝi
por la domo la ĉevalon,
por la speguleg' la selon,
por la ŝalo la ponardon.
De la montoj apud Cabra
sangas mi je ĉiu paŝo.
—Se de mi dependus tio,

vi la ŝanĝon farus, knabo.
Sed nek de mi, nek de l’ domo
estas jam mi mem la mastro.
—Dece kaj en lito propra
volas morti mi, kompano.
Lito kun batistaj tukoj
kaj kun kadro el metalo.
De la brusto ĝis la gorĝo
vundo strekas mian karnon.
—Centon da brunetaj rozoj
havas via ĉemizblanko.
Ĉirkaŭ via zono fluas
kaj odoras via sango.
Sed nek de mi, nek de l’ domo
estas jam mi mem la mastro.
—Lasu min almenaŭ iri
al verandoj en la alto.
Lasu min iradi supren
ĝis la verda verandaro!
Verandaro de la luno,
kie tumultadas akvo.

*

La kompanoj jam ascendas
al la alta verandaro.
Gutas sango sur la vojo.
Sur la vojo gutas larmoj.
Tremas ade sur tegmentoj
lanternetoj el ferlado.
La matenan ruĝon vundas
mil tintiloj el kristalo.

*

Verda, ĝin mi volas verda.
Verda vento. Verdaj branĉoj.
La du viroj supreniris.
La tre longa ventosago
lasas sur la lipoj guston
de ocimo, mento, galo.

—La knabino via trista,
kie estas do, kompano?
—Multajn fojojn ŝi atendis,
haroj nigraj, freŝaj vangoj,
multajn fojojn vin atendis
tie ĉi, en la verando!

*

La cigana junulino
flosas en la put-surfaco.
Verda karno, haroj verdaj
kaj arĝento-frida gapo.
Longa glacipeco luna
ŝin subtenas en la akvo.
Nokto iĝis jam intima,
kia tre malgranda placo.
Batojn donas sur la pordo
ebri-bruaj gvardianoj.
Verda, ĝin mi volas verda.
Verda vento. Verdaj branĉoj.
La ĉevalo sur la monto.
Kaj la ŝipo sur la maro.

## La cigana monaĥino

Al José Moreno Villa

Silento mirta kaj kalka.
Malvoj inter herbaj tigoj.
Nun la monaĥino rozon
brodas sur pajleska lino.
En la griza lustro flugas
la sep birdoj de la prismo.
La preĝejo fore grumblas
kiel urso sur la spino.
Kiel bele ŝi brodadas!
Kaj sur la pajleska lino
florojn ŝi sopiras brodi
el la propra fantazio.
Kiaj sunoflor' kaj strasa,
bantoriĉa magnolio!
Kiaj steloj kaj safranoj
por mes-tukoj de la kirko!
Kvin citronoj sin dolĉigas
en la kuireja niĉo.
La kvin vundoj de Jesuo
el kampar' de Almerio[8].
En la monaĥin-okuloj
tragalopas du rajdistoj,
kies surda, lasta zumo
de ŝi levas la ĉemizon.
Nubojn, montojn ŝi rigardas
en la krutan malproksimon,
kaj rompiĝas ŝia koro
el suker' kaj glicirizo.
Kiajn riveregojn starajn
vidas ŝia fantazio!
Kian lumon dudek-sunan
super ebenaĵ' en klino!
Sed ŝi sian floron brodas,
dum piede en la brizo

la taglumo ŝakon ludas
alte tra la ĵaluzio.

# La malfidela edzino

Al Lydia Cabrera kaj al ŝia negrineto

Nu, kredante ŝin fraŭlino
mi ŝin prenis al rivero,
sed ŝi estis jam edzino.
Estis en Jakoba nokto[9]
kaj pro preskaŭ sindevigo.
La lanternoj sin estingis,
kaj ekardis ĉirpe griloj.
Ŝiajn dormajn mamojn palpe
tuŝis mi ĉe stratofino,
kaj tuj sentis ilin flori
kiel hiacinta spiko.
La subjupo amelita
faris en orelo siblon,
same kiel silka peco
kiun ŝirus dek tranĉiloj.
Sen arĝentolumaj kronoj
arboj kreskis en la nigro.
Hundo-horizonto bojis
en la transrivera disto.

*

Preter la rubusaj veproj,
junkaj kaj kratagaj pikoj,
faris mi sub ŝiaj haroj
kavon en la seka ŝlimo.
Mi demetis la kravaton.
Ŝi demetis la ĉemizon.
Mi la zonon kun pistolo.
Ŝi la kvaron da gainoj.
Haŭton tiel fajnan havas
nek konketoj, nek lilioj.
La kristaloj kun lunlumo
havas ne similan brilon.

Sub mi la femuroj ŝiaj
glitis kiel trema fiŝo,
plenaj la duon’ de fajro,
plenaj la duon’ de frido.
Tiunokte mi vojaĝis
sur perleca ĉevalino
la plej ravan el la vojoj
sen la selo kaj la bridoj.
Mi, ĉar viro, ne rivelos
kiaj estis ŝiaj diroj.
Lumoj de la diskretemo
al mi diktas prudentiĝon.
Ni ekiris de l’ rivero,
kaj ŝin kovris sablo, kisoj.
Kun la vento bataladis
glavosvinge la iridoj.

Laŭ la moro mi kondutis,
kiel inda ciganido:
al ŝi donis kudrilujon
grandan, el flaveta silko,
kaj ne volis enamiĝi,
ĉar, estante jam edzino,
sur la voj’ al la rivero
ŝi deklaris sin fraŭlino.

# Romanco pri la nigra tristo

Al José Navarro Pardo

Pikaj bekoj de la kokoj
serĉe al aŭroro fosas,
kiam de obskura monto
venas Soledad Montoya.
Je ĉevalo kaj je ombro
ŝia kupra karn’ odoras.
Brun-ambose la du mamoj
ĝemas for kanzonon rondan.
—Kiun, Soledad, vi serĉas
sola kaj en denso nokta?
—Tio nur al mi koncernas.
Kial vi ne min ignoras?
Mi feliĉon mian serĉas,
la personon al mi propran.
—Soledad de mia penso,
se ĉevalo tro galopas,
ĝi al maro fine venas,
kaj en ties akvo dronas.
—Ne parolu pri la maro,
ke la nigra tristo fontas
el la teroj oliv-arbaj
sub folioj murmursonaj.
—Soledad, kiel vi tristas!
Kia tristo kororompa!
Vi en vana buŝ-atendo
sukon de citrono ploras.
—De la forno ĝis la lito
mi kuradas kiel fola,
kaj la du harplektoj dume
svingas sin al planko doma.
Kia tristo! Karno, vestoj
iĝis jam gagato-tonaj.
Ve, miaj ĉemizoj linaj!
Ve, miaj femuroj rozaj!

—Soledad, en alaŭd-akvo
al vi faru lavon korpan[10],
kaj en paco vian koron
lasu, Soledad Montoya.

*

Kantas sube la rivero:
franĝo firmamenta, fronda.
Pere de kukurbofloroj
nova lumo jam sin kronas.
Tristo, ve, de la ciganoj!
Tristo pura, ĉiam sola!
Tristo de subtera fluo
kaj de mateniĝo fora.

# San Miguel (Granada)

Al Diego Buigas de Dalmáu

De verandoj oni vidas
tra la monto, monto, monto,
mulojn kun la ombroj mulaj
sub la ŝarĝo de sunfloroj.

La okulojn bestajn kovras
en densejoj ega nokto.
La aŭroro sala krakas
en anguloj de la foro.

La okulojn plumbajn fermas
la ĉiel' el blankaj bovoj
kaj al duon-ombroj metas
finon per komencaj koroj.
Por eviti ies tuŝon
akvo iĝas fridaj ondoj.
Akvo fola kaj senkaŝa
tra la monto, monto, monto.

*

San Miguel, de puntoj plena,
staras en la tur-alkovo,
sian femurbelon montras
meze de lanterno-rondo.

Ĉefanĝelo kutiminta
al la dekdu-hora pozo,
li simulas la koleron
dolĉan de la orioloj.
Kantas san Miguel en vitroj:
li, efebo de mil noktoj,
kun odoro Kolonj-akva
kaj tre dista de la floroj.

*

Ondoj dancas sur la strando
poemaron de balkonoj,
dum la randoj de la luno
junkojn perdas, gajnas voĉojn.
Kun kovritaj pugoj kupraj
de planede rondaj formoj
venas junulinoj, manĝas
sunflor-semojn sur la vojo.
Venas altaj kavaliroj.
Venas damoj en malĝojo,
brunaj pro la nostalgio
al pase' kun orioloj.
Povra, blinda de safrano,
la Manila episkopo
diras meson kun du eĝoj
por virinoj kaj virhomoj.

*

En alkovo de la turo
san Miguel ne faras movon.
La subjupo lia densas
per brilaĵoj kaj per brodoj.

San Miguel la globojn[11] reĝas,
ankaŭ la neparajn nombrojn[12]
en la fajna belo maŭra
de diskrioj kaj balkonoj.

## San Rafael (Córdoba)

Al Juan Izquierdo Croselles

*I*

Fermitaj fiakroj venas
al la riverbordoj junkaj,
kies ondoj daŭre ŝlifas
torson de romano nuda.
Guadalquivir la fiakrojn
sternas sur kristal' matura
inter floroplenaj bildoj
kaj respeguladoj nubaj.
La aflikton de la mondo
knaboj plektas, kante zumas
apud la fiakroj oldaj,
svagaj en la nokt' obskura.
Sed Córdoba ne timtremas
antaŭ la mister' konfuza,
ĉar, se ombrojn suprenlevas
la arkitekturo fuma,
gambo el marmor' emfazas
sian ĉastan palon luman.
Ladpetaloj rompiĝemaj
brode garnas grizon puran
de zefiro disstreĉita
super triumf-arkoj rubaj.
Dek rumorojn de Neptuno
la ŝtonponto dismurmuras.
Kolportistoj de tabako
fuĝas tra ruino mura.

*II*

Sola fiŝo[13] en la akvo
la du Córdobajn apudas:
molan Córdoban de junkoj,
Córdoban arkitekturan.

Imitante al Tobio[14],
Merlinece[15] tali-suplaj,
buboj kun vizaĝo flegma
nudaj ĉe-rivere ludas.
Ili, por la fiŝon ĝeni
vokas per demando blufa,
ĉu ĝi volas vinofloron
aŭ salteton duonlunan.
Sed ĝi, kiu akvon oras
kaj marmoro-pecojn fulgas,
instruadas ekvilibron
de kolono ununura.
La muara Ĉefanĝelo
en brilaĵoj etaj, bluaj,
tra mitingoj de la ondoj
serĉas akvon flustran, lulan.

*

Sola fiŝo en la akvo.
Du Córdobaj bel-abundaj.
Córdoba ĉiela, seka.
Kaj Córdoba fonta, ŝpruca.

# San Gabriel (Sevilla)

Al S-ro Agustín Viñuales

***I***

Unu bela knabo junka
—svelta, kun la ŝultroj larĝaj
kaj kun varm-arĝenta nervo,
trista buŝ', okuloj grandaj,
haŭto de nokteca pomo—
sur dezerta strato vagas.
La daliojn de l' aero
rompas liaj ŝuoj lakaj
per du taktoj, kiuj metas
vibrojn de funebro sankta.
Sur la bordo de la maro
li superas belon palman;
ne egalas lin la reĝoj
nek la steloj vojaĝantaj.
Kiam li la kapon klinas
super sia brusta jaspa,
por ekfali surgenue
nokto serĉas kampon platan.
Per si mem gitaroj sonas
por san Gabriel la serafa,
kiu kolombetojn dresas[16]
kaj salikojn[17] albatalas.
—San Gabriel, la bebo ploras
en la ventro baldaŭ naska.
Ne forgesu: vian veston
al vi donis man' cigana.

***II***

Anunciación de los Reyes,
sino ŝvela, vesto aĉa,
de la pordo vokas stelon,
kiu sur la strato marŝas.

Jen rideto, jen lilio
estas san Gabriel serafa.
Li, Giralda[18] pranepeto,
al la domo ŝia paŝas.
En la veŝto puntoriĉa
nevideblaj griloj knaras.
Turnas sin en imortelojn
steloj de la nokto klara.
Ho, tri najlojn de kontento
pro vi, san Gabriel, mi havas.
Sur la vango-ruĝo mia
via hel' jasmenojn faras.
Di' vin gardu, Anunciación,
brunulino senkompara.
Naskos vi pli belan bebon
ol la brizo-tigo fajna.
San Gabriel de mia koro!
Ho, Gabriĉjo adorata!
Por sidigi vin, mi revas
seĝon el diantoj majaj.
—Di' vin gardu, Anunciación,
sino ŝvela, vesto aĉa.
Per makulo kaj tri vundoj
sin la bebo-brusto markas.
—San Gabriel de multaj briloj!
Ho, Gabriĉjo adorata!
En la fundo de la mamoj
tiklas jam la lakto varma.
—Di' vin gardu, Anunciación.
De vi, dinastioj startas.
Nudaj kampoj kun rajdistoj
tra pupiloj viaj pasas.

*

La etulo kantas ene
de Anunciación miranta.
En voĉeto lia tremas
kugloj tri verdamigdalaj.

Jam san Gabriel super tero

la ĉielon aleskalas.
Turnas sin en imortelojn
steloj de la nokto klara.

# Aresto de Antoñito Camborio sur la vojo al Sevilla

Al Margarita Xirgu

Antonio Torres Heredia,
fil' kaj nepo de Camborios,
al taŭrludoj de Sevilla
iras kun vimenbastono.
Li, brun-haŭta de lunverdo,
paŝas kun dandecaj movoj.
Liaj bukloj pomaditaj
brilas inter liaj brovoj.
Li citronojn rondajn tranĉas
en la mezo de la vojo,
kaj al akvo ilin ĵetas,
ĝis ĝi turnas sin en oron.
Kaj ĉe ulmo, sub la branĉoj,
en la mezo de la vojo,
gvardianoj kunkatenas
liajn manojn post la dorso.

*

Lante fluas for la tago.
La vespero, ĉe la vosto,
longan pasomovon faras
sur la maro kaj la rojoj.
La olivoj atendadas
sian Kaprikornan[19] nokton,
kaj rajdanta, kurta brizo
saltas super plumbaj montoj.
Antonio Torres Heredia,
fil' kaj nepo de Camborios,
sen vimenbastono paŝas
inter kvino da trikornoj[20].

—Antonio, kia vi estas?
Pro honoro de la nomo,
kial vi ne faris tiam
sangan kaj kvintruan fonton?
Vi nek estas ciganido
nek devenas de Camborios!
Ne ekzistas jam ciganoj,
kiuj spitus montan solon!
La tranĉiloj oldaj kuŝas
kolerante sub la polvo.

Je la naŭa horo nokte
paŝas li en la prizonon,
dum la gvardianoj suĉas
longajn limonadajn sorbojn.
Je la naŭa horo nokte
sidas li en ĉel-izolo,
dum la firmamento brilas
kiel pugo de stalono.

# Morto de Antoñito Camborio

Al José Antonio Rubio Sacristán

Sonis voĉoj de la morto
borde de Guadalquivir.
Oldaj voĉoj ringis voĉon
diantan de brava vir.
Ĉe la gamboj ilin vundis
mordoj de apro-kanin.
Luktis li farante saltojn
plenajn de delfena ŝmir.
Pro rivala sango densis
lia kravat-karmezin,
sed li frontis kvar ponardojn,
kaj la morto trafis lin.
Kiam stelo-lancoj pikis
bore al la akva griz,
kiam la taŭridoj sonĝis
pri manteloj[21] el lili,
sonis voĉoj de la morto
borde de Guadalquivir.

*

—Antonio Torres Heredia,
Camborio de dura krin[22],
brunahaŭta de lunverdo,
diant-voĉa, brava vir:
kiu prenis vian vivon
borde de Guadalquivir?
—Kvar Heredias, kuzoj miaj tiuj el Benamejí.
Senenviaj al aliaj,
ili ja enviis min
pro la ŝuoj vinkoloraj,
pro la ringo kun beril,
pro ĉi haŭto penetrita de jasmeno kaj oliv.
—Ve, Antoñito Camborio,

vere inda je reĝin!
La Virginon rememoru,
ĉar proksimas via fin.
—Ve, Federico García, voku al Civil-gvardi!
Mia korpo flanken krakas
kiel kano de maiz.

Li trifoje sangon vomis
kaj rigidis en profil.
Ne plu tia monerflanko
ripetiĝos en la viv.
Jam anĝelo danda metas
sian kapon sur muslin,
dum aliaj, lacaj ruĝi,
verŝas lumon per lumil.
Kaj jen kiam la kvar kuzoj
venis al Benamejí,
ĉesis voĉoj de la morto
borde de Guadalquivir.

## Mortinta de amo

Al Margarita Manso

—Kio lumas en la disto,
ĉe la altaj koridoroj?
—Sonis ĵus la dekunua,
filo, fermu jam la pordon.
—Mi rimarkas, eĉ senvole,
kvar lanternojn en la foro.
—Ĉar la transa gento tie
eble frotas kuprajn potojn.

*

Agonia ajl' arĝenta,
la malkreska lunkvarono
longajn harojn flavajn metas
al la flavatonaj domoj.
Nokto frapas tremetante
sur la vitroj de balkonoj.
Hundoj, kiuj ĝin ne konas,
ĝin postkuras en milopo,
kaj odoro vina, ambra,
venas de la koridoroj.

*

Brizo de humidaj kanoj
kaj rumoraj, oldaj voĉoj
eĥas tra l' rompita arko
de la noktomeza horo.
Dormas muloj, rozoj dormas,
kaj nur ĉe la koridoroj
la kvar lumoj ade klamas
kun koler' de sankt-Georgo.
Mornaj val-virinoj portas
sian sangon de virhomo

tristan je femuro juna,
pacan kiel velka floro.
Ĉe-riveraj oldulinoj
ploras baze de la monto
dum minuto neirebla
da hararoj kaj da nomoj.
La fasadoj kalkaj faras
blankan kaj kvadratan ombron.
La ciganoj kaj serafoj
ludas per akordionoj.
—Panjo, kiam mi pereos,
tion sciu la sinjoroj.
Sendu bluajn telegramojn
de la sudo ĝis la nordo.

Sep kriegoj kaj sep sangoj,
sep papavoj en duoblo
la opakajn lunojn fendas
en obskuro de salonoj.
Eĥas, mi ne scias kie,
ocean' da sakraj sonoj
plena de mortintaj manoj
kaj de etaj florokronoj.
La ĉielo pordofrapas
al la bruske brua bosko,
kaj la lumoj dume klamas
ĉe la altaj koridoroj.

# Romanco pri la amar-sorta

Por Emilio Aladrén

Mia sol' sen ripozado!
La okuloj miaj etaj
kaj la grandaj de l' ĉevalo
ne fermiĝas dum la nokto,
nek sin turnas al la flanko,
kie dektri-ŝipa sonĝo
velas for en muta paco.
Per okuloj puraj, duraj
ĉiam en konstanta vado,
mi rigardas unu nordon
de rokegoj kaj metaloj,
kie mi, senvejna korpo,
prenas frostajn ludokartojn.

*

Densaj akvo-bovoj[23] puŝas
kun impeto al la knaboj,
kiuj banas sin en lunoj
de ondantaj korno-paroj.
Sur ambosoj somnambulaj
tintas la martelofrapoj
pri sendormo de l' rajdisto,
pri sendormo de l' ĉevalo.

*

La dudekan de junio
oni diris al Amargo:
—Se vi volas, jam dehaku
en la korto vian laŭron.
Sur la pordo de la domo
skribu vian epitafon,
ĉar cikutoj kaj urtikoj

puŝos sin tra via haŭto,
kaj humidaj kalkopintoj
al vi mordos tra la plando.
En la nokto ĝi okazos,
en tenebro de montaro,
kie junkojn sonĝe trinkas
densaj bovoj de la akvo.
Petu preĝojn kaj kandelojn,
lernu kruci jam la manojn
kaj ekŝatu fridan venton
de rokegoj kaj metaloj,
ĉar vi kuŝos en la ĉerko
ĉe la fin' de du monatoj.

*

Santiago[24] supre movas
grandan nebulozan glavon
Kaj silento grava, dorsa,
fontas de ĉiela alto.

*

La dudekan de junio
li apertis l' okulparon.
La dudekan de aŭgusto
ĝin li fermis por ĉiamo.
Sur la strato venas homoj
por rigardi al Amargo.
Reflektiĝas sur la muro
lia sol' en ripozado.
Kaj la senmakulaj tukoj,
de Romana, sobra stampo,
igas morton ekvilibra
per la rektoj de la faldoj.

# Romanco pri la hispana Civil-gvardio

Al Juan Guerrero,
ĝenerala konsulo de la poezio

Nigraj estas la ĉevaloj,
la hufumoj same nigras,
kaj makuloj inkaj, vaksaj,
sur gvardi-manteloj brilas.
Stan-kraniojn ili havas,
tial do je plor' aridas.
Kun la koro nigre laka
sur la vojo ili iras.
Ĝibe kurbaj kaj noktecaj
ili ie ajn inspiras
muton de obskura gumo,
timon de pulvor' subtila.
Ili pasas, se volontaj,
kaj en ties kapo sidas
ia astronomiaĵo
de pistoloj sendifinaj.

*

Ho, la urbo de ciganoj!
En anguloj flagoj flirtas.
Ĉe la luno, kalabaso
kun la marmelad' ĉeriza.
Ho, la urbo de ciganoj,
sopirata se vidita!
Urbo de dolor' kaj mosko
kun la turoj flave grizaj.

*

En la falo de la nokto,
nokto nokte nokt-intima,
la ciganoj, ĉe ambosoj,

sagojn, sunojn elfabrikas.
Kaj ĉevalo vundoplena
ĉiun pordon voke krias.
Ĉe Jerez de la Frontera[25]
vitrokokoj kikerikas.
La angulon de surprizoj
la zefiro nuda giras,
en la nokto nokt-arĝenta,
nokto nokte nokt-intima.

*

San José kaj la Virgino
perdis kastanjeton sian,
la ciganojn ili serĉas
por laboro lokaliza.
La Virgino venas, portas
la kostumon urbestrinan,
kun kolringoj el migdalo
kaj ĝiskape stanfolian.
San José la brakojn movas
de sub la mantelo silka.
Poste venas Pedro Domecq[26]
kun tri reĝoj ekzotikaj,
dum la lunduono sonĝas
pri ekstazo cikonia.
De standardoj kaj lanternoj
la terasoj invadiĝas.
Sur speguloj plorsingultas
dancistinoj sentaliaj.
Ĉe Jerez de la Frontera
nigro akva, akvo nigra.

*

Ho, la urbo de ciganoj!
En anguloj flagoj flirtas.
Blovu for la verdajn lumojn:
la merita[27] jam proksimas.
Ho, la urbo de ciganoj,
sopirata se vidita!

Tenu ĝin for de la maro,
ĝiajn harojn — senkombilaj.

*

Ili marŝas po du vice
al la ciganurbo rida.
En la kartoĉujojn fluas
ia zumo helikriza.
En duobla noktotolo
ili en duopoj vicas.
Vitrinego spronoplena
ili la ĉielon vidas.

*

La senzorga, gaja urbo
siajn pordojn multiplikas.
Tiam kvardek gvardianoj
traas ilin sang-avidaj.
Mutas tuj tiktak' horloĝa.
Por ne vidi sin viktima,
la konjako de l' boteloj
sub novembro-maskon glitas.
Ondo de longegaj krioj
de la ventokokoj drivas.
Sabroj tranĉas la zefiron,
kiun hufoferoj pistas.
Sur la stratoj duon-ombraj,
oldulinoj jam panikas
kun terpotoj monerplenaj,
kun ĉevaloj dorm-insistaj.
Sur la suprenklinaj stratoj
venas mantelar' sinistra
postlasante efemerajn
kirlojn de tondil' subita.

En la Bet-Leĥema korto
la ciganoj sin grupigas.
San José, de vundoj plena,
mortan junulinon vindas.

Tra la tuta nokto sonas
la fusiloj krak-obstinaj.
La Virgino flegas knabojn
per ungvento stel-saliva[28].
La civil-gvardia roto
fajrojn dum la ir' prodigas,
kaj en ili, juna, nuda,
la imago sin kalcinas.
Rosa, de Camborios-tribo,
kriĉas apud pordo, sidas
kun telero, kie kuŝas
ŝiaj mamoj fortranĉitaj.
Junulinojn persekute
la harplektoj propraj vipas
en aero, kie krevas
rozoj de paf-pulvo nigra.
Post ol la tegmentoj iĝis
sulkoj en la grundo cindra,
dorse ŝovas sin l' aŭroro
laŭ la longo ŝtonprofila.

*

Ho, la urbo de ciganoj!
La Civil-gvardi' foriras
tra tuneloj de silento
dum la urbon fajro ringas.
Ho, la urbo de ciganoj,
sopirata se vidita!
Serĉu ĝin en mia frunto.
Lun' en sablon sin implikas.

# Tri historiaj romancoj

## Martirigo de santa Olalla

Al Rafael Martínez Nadal

### *I. Panoramo de Mérida*

Sur la strato salte kuras
virĉeval' kun longa vosto,
dum monludas aŭ dormetas
olda soldatar' de Romo.
Duonmonto da Minervaj
streĉas siajn nudajn frondojn.
Akvo nestabila oras
eĝajn randojn de la rokoj.
Nokto kun stel-nazoj noĉaj
kaj kuŝantaj ŝtonotorsoj
por renversi sin komplete
volas fendojn de l' aŭroro.
De sakrado ruĝakresta
iam tiam venas sonoj.
Ĝemoj de l' knabino sankta
faras al la glasoj rompojn.
Rado jam akrigas pinton
de tranĉiloj kaj de hokoj.
La ambosa taŭro blekas.
Mérida surmetas kronon
el nardetoj vekiĝantaj
kaj el rubus-branĉaj ŝosoj.

### *II. La martirigo*

Nuda, Flora supreniras
sur la ŝtupetaroj akvaj.
La konsulo petas pleton
por la mamoj de Olalla.
Ŝpruca flu' el verdaj vejnoj
tra la gorĝo ŝia plaŭdas.

Ŝia sekso tremas krispe
kiel birdo enkrataga.
Ŝiaj manoj dehakitaj
sur la planko dise saltas,
tamen ili povas fari
ian preĝan geston svagan.
En la loko de la mamoj
tra du truoj ruĝaj, larĝaj
ekaperas ĉieletoj
apud rojoj lakte blankaj.
Ŝian tutan dorson kovras
miloj da arbetoj sangaj,
kies humidec' oponas
al la bisturioj flamaj.
Flavaj centurio-estroj
grizahaŭtaj, dormomankaj,
venas al ĉielo, sonas
inter si kirasoj ŝtalaj.
Kaj dum glavoj kaj kolharoj
vibras en konfuzo granda,
la konsulo portas plete
karbajn mamojn de Olalla.

### III. Infero kaj paradizo

Ondoforma neĝo dormas.
Pendas de la arb' Olalla.
La aeron frostan fulgas
ŝia nuda korpo karba.
Brilas nokto disstreĉita.
Mortas en la arb' Olalla.
El inkujoj de la urboj
sin elverŝas inko lanta.
Nudaj tajlor-manekenoj
nigras sur la neĝo kampa
kaj en longaj vicoj ĝemas
sian kriplan muton staran.
Disa neĝo komenciĝas.
Blankas en la arb' Olalla.
En torako ŝia pike
ŝtal-ortiloj kunkontaktas.

Sur ĉielo kalcinita
unu hostiujo sparkas
inter riveretaj gorĝoj,
inter branĉoj najtingalaj.
Krevas vitroj de koloroj!
En la blank' Olalla blankas.
La serafoj kaj anĝeloj
diras: sankta, sankta, sankta.

# Moko pri don Pedro sur ĉevalo. Romanco kun lagetoj

Al Jean Cassou

## Romanco pri don Pedro rajdanta

Don Pedro sur pado
alvenas de l' disto.
Ho ve, kiel ploras
la kavaliro!
Li rajdas rapidan
ĉevalon sen bridoj,
kaj venas serĉante
kaj panon kaj kison.
Kaj ĉiuj fenestroj
demandas la brizon
pri l' ploro obskura
de l' kavaliro.

## Unua lageto

Sub la akvo
ankoraŭ la vortoj.
Sur la akvo
la lunon rondoforman
en sinbano
envias la alia

en la alto.
Akvorande
infano
vidas la lunojn kaj diras:
—Nokto: ludu la cimbalojn!

Daŭrigo

Al iu urbo fora
alvenas jam don Pedro.
Al iu urbo ora
en mezo de la cedroj.
Ĉu Bet-Leĥem'? Tra brizo
verben' kaj rosmareno.
Terasoj, nuboj brilas.
Trapaŝas jam don Pedro
rompitan, ruban arkon.
Kun lampoj el arĝento
oldul' kaj du virinoj
aliras al don Pedro.
La poploj diras: —Ne.
La najtingal': —Ni spektos.

## Dua lageto

Sub la akvo
ankoraŭ la vortoj.
Sur la kombo de la akvo
unu cirklo de birdoj kaj de flamoj.
Inter la kanejoj,
atestantoj sciantaj pri la mankoj.
Sennorda sonĝo fakta
de ligno de gitaro.

Daŭrigo

Oldul' kaj du virinoj
kun lampoj el arĝento
sur la vojeto glata
aliras al tombejo

kaj, inter la safranoj,
renkontas la skeleton
de la ĉevalo sombra
de don Pedro.
Sekreta voĉo tarda
trabeas la ĉielon.
Sur vitro pinton rompas
la korno de foresto.
La dista urbo ardas
en fajreroj,
kaj viro plore iras
land-internon.
Maristo, ĉe la sudo.
Kaj ĉe la nordo, stelo.

## Lasta lageto

Sub la akvo
troviĝas la vortoj.
Ŝlimo de perditaj voĉoj.
Kaj sur la frida floro
don Pedro, forgesita,
ve!, ludas kun la frondoj.

# Tamar kaj Amnon

Por Alfonso García-Valdecasas

En ĉielo luno giras
super la kampar' sen akvo,
dum somero dise semas
zumojn de panter' kaj flamo.
Laŭ la supro de tegmentoj
sonas nervoj el metalo.
Krispa vento sin alblovas
kun la beoj de la lano,
kaj la teron oni vidas
dismarkita de cikatroj,
aŭ tremanta de kaŭteroj

akraj de la lumaj blankoj.

*

Tamar estas imaganta
birdotrila sian langon
je la son’ de citroj lunaj
kaj de mutaj fifrokanoj.
Akut-eĝa palma nordo,
ŝia ombro, sur la vando,
petas de la ventro flokojn,
petas de la dorso hajlon.
Tamar estas kantetanta
nudakorpe sur teraso.

*

Kvin kolomboj frostiĝintaj
sidas ĉirkaŭ ŝiaj gamboj.
Kun ingveno ŝaŭmoplena
kaj oscilo de la barbo,
Amnon, magra kaj konkreta,
gvatas ŝin de turorando.
Ŝia nudo lunobrila
sin etendas sur la planko,
kun rumoro interdenta
de ĵus penetrinta sago.
Al la luno horizonta
Amnon turnas la rigardon,
kaj li vidas en la luno
la fratinajn durajn mamojn.

*

Amnon je la tria horo
sternas sin en la lit-ĉambro.
La okuloj flugilplenaj
al ĝi kaŭzas suferadon.
La masiva lumo puŝas
urbojn en la grizan sablon,
aŭ rivelas efemerajn

papavet- kaj rozkoralojn.
Kunpremata puta limfo
naskas muton en pokaloj.
Sur la musko de la trunkoj
siblas la vipera faŭko.
Amnon ĝemas en la lito
meze de la freŝaj drapoj,
dum heder' el fridotremoj
kovras lian brulan karnon.
Vibra de efluvoj foraj,
kun Danubaj, vejnaj vangoj,
en silento ŝi eniras
la silentan frato-ĉambron.
—Tamar, la rigardon mian
viŝu via aŭrorklaro.
Miaj sang-fadenoj garnas
vian jupon per falbaloj.
—Frato, lasu min trankvila.
Viaj kisoj sur la haŭto
estas vespoj kaj ventetoj
en duobla flutosvarmo.
—Tamar, vokas min du fiŝoj
el rigidaj viaj mamoj,
kaj, el viaj fingropulpoj,
surda zumo de dianto.

*

En la korto de la reĝo
henas cento da ĉevaloj.
Blokan sunon eltenadas
feblo de la vitolaŭbo.
Jam li ŝiras ŝian veston,
jam li prenas ŝin je l' haroj,
kaj koraloj varmaj skizas
rojojn sur blondeta mapo.

*

Kiajn kriojn oni aŭdas
supre de la domo-altoj!

Kia denso da tranĉiloj,
da tunikoj en ŝiraĵoj!
Sklavoj supren suben iras
laŭ la tristaj balustradoj.
Hastas piŝtoj kaj femuroj,
dum la nuboj faras halton.
Virgaj ciganinoj veas,
ĉirkaŭ Tamar verŝas larmojn
de l' martirigita floro
prenas la gutantan sangon.
Sin ruĝigas blankaj tukoj
en fermitaj dormoĉambroj.
Flustrojn de aŭror' tepida
ŝanĝas fiŝoj, vitobranĉoj.

*

Furioza perfortinto
Amnon fuĝas sur ĉevalo.
De gvatejoj kaj kreneloj
negroj celas lin per arkoj.
La kvar hufoj de la besto
iĝas jam kvar resonancoj,
kaj Davido tonde rompas
ĉiujn kordojn de la harpo.

2 *Nardo*. Ĉi tie, kaj en aliaj partoj de la libro, «tuberosa floro».

3 Tiu rajdanto aperas jam en la Biblio. «Kaj mi rigardis kaj jen pala ĉevalo: kaj la nomo de la sidanta sur ĝi estis Morto». *Apokalipso*, VI-8.

4 La karabenistoj estis membroj de iama ĝendarmaro kun antikontrabanda funkcio.

5 *Albacete*. Hispana provinco, kie fabrikiĝas famaj armiloj klingaj.

6 *Gvardianoj*. Mallongigo de «civil-gvardianoj», membroj de renoma, hispana ĝendarmaro nomata *Guardia Civil*.

7 *Mortis kvar Romanaj viroj, ankaŭ kvin Kartago-regnaj*. Popola diro signifanta: okazis nenio, la afero ne gravas, ne valoras atenton.

8 *Almerio*. Unu el la ok provincoj andaluzaj.

9 *Jakoba nokto*. Nokto de sankta Jakobo, kies feston oni celebras la 25-an de julio.

10 Laŭ andaluza superstiĉo, sinbano en loko, kie alaŭdoj trinkas, forgesigas afliktojn kaj ĉagrenojn.

11 *Globo* signifas «anĝelon» en la katolika simboliko.

12 Per la *neparaj nombroj* oni aludas la sep ĉefajn virtojn kaj la sep mortomeritajn pekojn.

13 En la katolika ikonografio, *fiŝo* estas atributo de sankta Rafaelo.

14 *Tobio*. Sanktulo, kiu, en akompano de sankta Rafaelo, portis specialan fiŝon al sia blinda patro. Ĉi tiu retrovis sian vidopovon aplikante sur la okuloj la galon de tia fiŝo.

15 *Merlino*. Sorĉisto, magiisto, fikcia persono, kiu ludas gravan rolon en la kavaliraj romanoj. Li havas longan tradicion en la hispana beletro.

16 En la katolika simboliko, *salikoj* reprezentas «pekon».

17 Pri sankta Gabrielo «dresisto» de kolomboj, oni legu en la Biblio: «Kaj la anĝelo [Gabrielo] responde diris al ŝi: la Sankta Spirito venos sur vin». *Sankta Luko*, I-35.—Oni memoru, ke la Sanktan Spiriton oni simboligas per kolombo.

18 *La Giralda*. Famega maŭro-devena kampanilo de la katedralo de Sevilla, populara simbolo de la urbo mem.

19 En Andaluzio oni rikoltas la olivojn en decembro kaj januaro, t. e. sub la zodiaka signo Kaprikorno.

20 *Trikornoj*, anstataŭ *trikornuloj*, t. e. civil-gvardianoj. Aludo al la tipaj trikornaj ĉapeloj, kiujn portas tiuj ĝendarmoj.

21 *Manteloj*. Ĉi tie la specialaj manteloj, per kiuj la toreadoroj faras pasmovojn al la taŭroj.

22 *de dura krin'* signifas «kuraĝa, kun medolo en la ostoj».

23 *Densaj akvo-bovoj*. Bildeca esprimo andaluza por indiki fluon lantan sed potencan de rivera akvo.

24 *Santiago*. Alia nomo de sankta Jakobo. En Hispanujo la Lakta Vojo populare nomiĝas «la vojo de Santiago». Kvankam la hispana prononco estas «santjago», en ĉi verso oni prononcas ĝin kvar-silabe, kiel en Esperanto.

25 *Jerez de la Frontera*. Urbo andaluza (provinco Cádiz) fama pro sia ŝereo.

26 *Pedro Domecq*. Proprietulo de fama entrepreno produktanta konjakon.

27 *La merita*. Hispane *la benemérita*. Duonoficiala epiteto de Civil-gvardio, signifanta proksimume «merita pro siaj bonaj agoj». Evidentas la ironia intenco de la poeto.

28 La karibaj indianoj de Venezuelo nomas la roson *ĉirike jetaku*, laŭlitere «salivo de steloj»!

# PROKSIMUMA PRONONCO DE PROPRAJ NOMOJ

Ĉi-sube aperas nur la hispanaj propraj nomoj, kiujn oni ne prononcas laŭ la Esperanta ortografio.

Streko super vokalo signas akcentan silabon. Kiam streko mankas, la akcento estas sur la antaŭlasta silabo.

| **Hispana ortografio** | **Proksimuma prononco** |
|---|---|
| Albacete | *Albasete* |
| Antonio Torres Heredia | *Antonjo Tores Eredja* |
| Antoñito Camborio | *Antonjito Kamborjo* |
| Anunciación de Ios Reyes | *Anunsjasjon de los Rejes* |
| Benamejí | *Benameĥí* |
| Cabra | *Kabra* |
| Córdoba | *Kórdoba* |
| Domecq | *Domék* |

| **Hispana ortografio** | **Proksimuma prononco** |
|---|---|
| Federico García Lorca | *Federiko Garsia Lorka* |
| Gabriel | *Gabriél* |
| Giralda | *Ĥiralda* |
| Guadalquivir | *Gŭadalkibír* |
| Jerez de la Frontera | *Ĥerés de la Frontera* |
| José | *Ĥosé* |
| Juan Antonio de Montilla | *Ĥŭan Antonjo de Montilja* |
| Mérida | *Mérida* |
| Miguel | *Migél* |
| Olalla | *Olalja* |
| Preciosa | *Presjosa* |
| Rafael | *Rafaél* |
| Soledad Montoya | *Soledá Montoja* |
| Sevilla | *Sevilja* |

# DANKOJ

## Por la unua eldono

Mi volas aparte esprimi ĉi tie mian profundan dankon al amiko Henri Vatré, kies afablaj instigoj, kaj saĝaj, ĉiam pretaj konsiloj grave kontribuis al la efektivigo de *Cigana romancaro* en Esperanto.

Tri tradukoj: *Romanco pri la luno, luno*, *La malfidela edzino* kaj *La cigana monaĥino* estas pliparte produkto de lia plumo; kaj ne malmultaj aliaj versoj portas la markon de lia brila inspiro.

Ankaŭ al S-ino Isabel García Lorca, fratino de la karmemora poeto, ni ŝuldas grandan dankon pro ŝia bonvolo rajtigi nin eldoni ĉi tiun libron, kaj al F-ino Inés Gaston pro ĉi ties ĉiuflanka kaj sindona helpo.

F. de Diego

## Por la dua eldono

Ana Manero kunordigis la projekton, reviziis la skanitan tekston, verkis la prezenton, kaj desegnis kaj dezajnis la kovrilon.

Manolo Parra skanis kaj tekstigis la originalan eldonon.

Antonio Valén verkis novan enkondukon kaj solvis la lingvajn dubojn.

Marcos Cruz kreis la bitlibron kaj reviziis la tekston.

# ILOJ

Ĉi tiu bitlibro estis kreita per jena libera programaro:

- Operaciumo Debian.
- Interfaco: grafika fenestro-mastrumilo Ratpoison; terminala fenestro-mastrumilo GNU Screen; perklavara mus-kursorumilo keynav; klavar-aranĝo Dvorak.
- Redaktilo Neovim.
- Marklingvo kaj teksto-procezilo Asciidoctor.
- Dokumento-tradukiloj Pandoc kaj Asciidoctor EPUB3.
- Dosier-administrilo Vifm.
- Versi-tenilo Fossil.

# Table of Contents


- Prezento de ĉi bita eldono
- Pri la aŭtoro
- Antaŭparolo por la dua eldono, de Antonio Valén
    - Unua ekzemplo
    - Dua ekzemplo
    - Tria ekzemplo
    - Kaj du citaĵoj
- Antaŭparolo de William Auld
- Enkonduko
    - Ĝenerala superrigardo
    - La dua plano de García Lorca
    - La metaforismo
    - Grupigo de la romancoj
- Cigana romancaro
    - Romanco pri la luno, luno
    - Preciosa kaj la vento
    - Duelo
    - Somnambula romanco
    - La cigana monaĥino
    - La malfidela edzino
    - Romanco pri la nigra tristo
    - San Miguel (Granada)
    - San Rafael (Córdoba)
    - San Gabriel (Sevilla)
    - Aresto de Antoñito Camborio sur la vojo al Sevilla
    - Morto de Antoñito Camborio
    - Mortinta de amo
    - Romanco pri la amar-sorta
    - Romanco pri la hispana Civil-gvardio
    - Tri historiaj romancoj
- Proksimuma prononco de propraj nomoj
- Dankoj
    - Por la unua eldono
    - Por la dua eldono

Iloj